

Joseph Freiherr von Eichendorff,

La rompiĝinta ringeto

tradukita de Chr. Pfeufer

En ombra valo turnas
muela rado sin.
Jen loĝis mia kara -
ŝi nun forlasis min.

Fidelon ŝi promesis,
ringeton donis ŝi:
Fidelon ŝi forgesis,
rompiĝis ring' de mi.

Migradi mi dezirus
for, kiel muzikant';
kaj kie ajn mi irus,
resonus mia kant'.

Mi volus bataladi,
rajdante tra l'kampar',
ĉe l'fajro dormkuŝadi
dum nokt' en la tendar'.

La rado plu rondiras;
revante aŭdas mi.
La morton mi sopiras,
kvieton donus ĝi.

...

Joseph Freiherr von Eichendorff,

In frigida convalle

tradukita de N. N. 94

1. In frigida convalle
Rota molaris it,
Amata ibi degens
Nostra evanuit.

2. Pollicita mi fidem
Mi dedit annulum,
Fide sed ista laesa,
Fractum est vinculum.

3. Nunc ludens proficiscor
In orbem maximum
Et canto meos modos
De domo ad domum.

4. Nunc in cruentam pugnam
Eques citus volem,
Obscura nocte circum
Mutos ignes cubem!

5. Cum audio molarem,
Ignoro quid faciam -
Gratissimum est mori,
Ut semper sileam.

...

*Traduko de la Germana poemo “In einem kühlen Grunde” de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de Chr. Pfeufer.*

Arg-1035-2101 (2014-05-31 17:34:45)

Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro “Internacia Kantaro”, eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lipsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann, sur la paĝo 22 kaj 23. Erare estas indikite tie, ke la poeziaĵon verkis Wilhelm Müller.

*Traduko de la Germana poemo “In einem kühlen Grunde” de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en la Latinan de N. N. 94.*

Arg-1035-2102 (2014-05-31 18:12:03)

Tiu ĉi latinigo troviĝas en <http://ingeb.org/Lieder/ineinemk.html>.